

István Szerdahelyi sesdekjaras.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1984 novembro 29 kaj decembro 01.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-135/Radiokasedo-135-2-850-1985-Claude-kaj-Andree-GACOND-Istvan-Szerdahelyi-sesdekjaras.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Alvenis la momento rigardi en nia leterujo la alvenintaĵojn, kiuj atendas respondon kaj indas je atento.

A.- Inter tiuj dokumentoj, ne troviĝas nur leteroj kaj poŝtkartoj, sed ankaŭ kreskanta nombro da revuoj, ĉar la redakcioj pli kaj pli konscias, ke la esperanto-fakoj de la radio-elsendejoj indas je informado koncerne la propran organon kaj la aktivecon, kiun ĝi respegulas.

Cl.- Inter tiuj organoj unu el la plej atentindaj estas BUDAPEŝTA INFORMILO, kies redaktoro estas d-ro Árpád Máthé. Budapeŝta Informilo estas esperanto-revuo, kies nivelo estas ĉiurilate komparebla al tiu de gravaj revuoj nacilingvaj. Ĝia fideindeco estas konata. La varieco de la informoj, kiujn ĝi alportas monaton post monato estas nekredeble riĉa. Tial tiu ĉi organo ĉiam altiras nian atenton.

A.- La aŭgusta numero krome altiris nian rigardon per sia kovrilpaĝo. Jen sur ĝi rigardas al ni d-ro István Szerdahelyi, kiu instruas esperanton en la universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto kaj kiun ni bone konas en Svislando per la prelegoj kaj seminarioj, kiujn li gvidis en la kadro de la aktiveco de Kultura Centro Esperantista. La venontan someron li ree gvidos kurson en La Chaux-de-Fonds ĵus antaŭ la Universala Kongreso. Tial ni tuj malfermis tiun aŭgustan numeron de Budapeŝta Informilo, ĉar ni antaŭvidis, ke io grava okazis rilate al nia ŝatata prelegisto István Szerdahelyi, kiun vi jam aŭdis per la ondoj de Svisa Radio Internacia.

Cl.- Kaj ni legis, komence de la 5-paĝa artikolo, kiun ni ŝatus povi komplete citi al vi, ke li fariĝis 60-jara la 20-an de aŭgusto 1984. Iom malfrue ni celebras tiun ĉi sesdekan jubileon per laŭtleĝo de eroj el tiu tre interesa biografio subskribita Zs. Varga-Haszonits. Ni citu tion, kio koncernas la enkondukon de esperanto en la universitatan instruadon.

A.- "Antaŭ 18 jaroj d-ro István Szerdahelyi komencis sian profesoran agadon en la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko de Filologiscienca Fakultato de Universitato Eötvös Lóránd (ELTE)...

Cl.- Lia faka kaj homa biografio unuflanke, kaj la historio kaj rezultoj de la Esperanto-instruado en Hungario kaj tiu de la universitata fako aliflanke - estas neniel disigeblaj. Ni provu skizi lian vivovoĵon kiel pedagogo.

A.- Naskiĝinta en 1924 en Avasfelsőfalu (nun Hegrest, Rumanio), István Szerdahelyi finis siajn studojn jam en Budapeŝto, doktoriĝinte en 1951 en la Jura Fakultato de Universitato ELTE. Paralele kun la jursciencaj studoj, li vizitis kaj sukcese finis, inter la jaroj 1947 kaj 1949 la kurson pri diplomatio kaj ekstera politiko de Hungara Instituto pri Eksterlandaj Aferoj...

Cl.- Poste, ĝis la jaro 1966 (sed jam de 1949) li okupiĝis pri la lerneja instruado de la rusa lingvo (kiun li alproprigis en soveta militkaptiteco). Tiu okupiĝo konsistis kaj el praktika instruado de tiu lingvo en lernejoj (bazaj, mezaj kaj superaj), kaj el metodologia agado, verkado de lernolibroj, porkursaj helpmaterialoj, teoriaj studoj, artikoloj metodologiaj en

diversaj fakrevuoj. Tuta generacio konatiĝis profunde kun la rusa lingvo surbaze de liaj lernolibroj verkitaj por mezlernejoj.

A.- Sed ni vidu, kiel komenciĝis lia esperantista kariero. La decida paŝo, kiu poste "alidirektis" lian vivovojon, okazis en 1949, kiam li ellernis nian lingvon, sub la gvido kaj apogata de Ludoviko Dér. Kaj kiom sukcese, ke jam en la akademia jaro de 1949 al 1950 oni komisiis lin gvidi bazan kurson por lernantoj kaj instruistoj. Tiu kursgvidado senĉese daŭris ĝis la jaro 1961...

Cl.- La 14-an de novembro 1961, dum la kunsido de instrukomisiono de Hungara Esperanto-Asocio oni konstatis, ke por antaŭenigi la aferon de Esperanto bezonatas modernigi la instruon kaj precipe la lernejan politikon. La komisiono decidis eldoni gvidlibron kies instrumentodan ĉapitron verkis István Szerdahelyi, kaj taŭgan lernolibron por kursoj kaj lerneja instruado. Ties fina formo aperis en 1965, verkita de Szerdahelyi...

A.- En 1966 oni integris ankaŭ Esperanton en la sistemo de ŝtataj ekzamenoj, kaj d-ro Szerdahelyi fariĝis la prezidanto de ŝtata ekzameno pri Esperanto.

Cl.- ... Dume, en la oficiala bulteno de la Kleriga Ministerio aperis la 1-an de oktobro de 1963 la ministeria decido..., laŭ kiu oni povas instrui Esperanton en lernejoj kiel libervole elektitan lingvon, laŭ la samaj kondiĉoj, kiel la aliajn lingvojn. Sed tiam d-ro Szerdahelyi jam plupaŝis: li preparis la unuan projekton por la enkonduko de Esperanto en la pedagogiajn altlernejojn kaj universitatojn.

A.- Kun amatora entuziasmo aŭ entuziasma amatoreco oni ne povas respondi al la oficialaj pretendoj. Tial d-ro Szerdahelyi antaŭpreparis la universitatan grundon: en la Jura Fakultato - ĉar rekte "enpenetri" en la Filologian Fakultaton ne eblis ankoraŭ - li organizis kadre de la Junulara Organizaĵo sciencan studrondon de Esperanto, kiu eldonis eĉ revuon... La grundo estis tiom preparita por la supernivela instruado de la lingvo, ke d-ro Szerdahelyi - interkonsente kun la tiama afergvidanta sekretario de Hungara Esperanto-Asocio - kompilis petleteron al la Ministerio pri Klerigo, sur propra risko kaj respondeco... La Ministerio permesis la enkondukon de Esperanto-fako en la Filologiscienca Fakultato de Universitato ELTE. Hungara Esperanto-Asocio delegis s-ron Szerdahelyi, kiu estis komisiita ankaŭ de la Fakultato por gvidi kaj organizi la fakon...

Cl.- Gl.- La vivo de István Szerdahelyi dum tiuj lastaj, preskaŭ du jardekoj estis forte ligita al la vivo kaj evoluo de tiu universitata specialaĵo. Se ni mencias la nomhron de gestudentoj, kiuj sukcesis kun siaj studoj kaj ricevis la diplomon, nepre kaj tuj ni devas aldoni, ke tiuj ĉirkaŭ cent personoj forlasis la universitaton riĉiĝintaj ne nur je teoria scio, sed ankaŭ je valoraj, praktikaj metodologiaj konoj... Ili ekkonis kaj aŭskultis dum jaroj veran pedagogon, kiu kapablis transdoni al ili vivospertojn, fidon, gajecon, optimismon, kredon je la pli bona lingva sorto estonta de la homaro, laboremon, estimon de la scienco, de la elektita profesio.

A.- Ne estas do hazarde, ke d-ro Szerdahelyi apartenas al tiuj - bedaŭrinde, ege malmultaj - universitataj instruistoj, kiuj eĉ post multaj jaroj sekvas la sorton de siaj eksaj studentoj, kaj kiun la eksaj studentoj regule vizitas, al kiu ili ofertas helpon, apogon.

Cl.- Vi aŭdis citaĵojn el la revuo Budapeŝta Informilo okaze de la sesdekjara jubileo de István Szerdahelyi. Tre verŝajne venontjare vi ree havos la okazon aŭdi lin paroli okaze de intervjuo de Svisa Radio Internacia, ĉar li prelegos en La Chaux-de-Fonds pri interlingvistikaj demandoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la eltiron de dokumentoj el la leterujo, kie atendas multaj neresponditaj leteroj. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*